Finfine — por reveni al jam uzita vorto — ũosa kongreso. Pri tio verŝajne neniu surpriziĝis, kiu jam spertis unu el la grandaj UKoj. Fakte la surprizo, kiun oni ofte aŭdis en Varsovio, temis pri la relative glata funkciado de la tuta programo. Nur kelkaj ĝenaĵoj atestis pri la postsceneja paniko. I.a. la pola turisma agentejo Orbis tre malekvide alfrontis sian taskaron; la giĉetoj spertis kelkajn krizojn, kiel malaperon de insignoj kaj Kongresaj Libroj; la Infana Kongreseto estis skandale misplanita... Verŝajne ĉiuj havas kritikojn grandajn aŭ malgrandajn. Sed ĉio finfine solviĝis, mirakle, pene, malgraue; jen dank' al LKK, jen dank' al la kongresanoj mem. Varsovio sukcesis kiel festo, sed pli grave, ĝi sukcesis kiel manifestacio... pri la viglo kaj vivanteco de nia centjara movado.

\*\*\*\*\*

### 72a UNIVERSALA KONGRESO EN VARSOVIO

#### KULTURA FAJRAĜO!

Neniam Kongreso prezantis tian diversecon, tian multegon de kulturaj aranĝoj!

= 40 teatrajoj estis donacitaj. Povas esti nomitaj kelkaj trupoj, la Krizalido la Teatro Powszechny, la Bulgara E<sup>o</sup>-Teatro, Verda Monto...

= 10 projekcioj okazis pri diversaj temoj: Esperanto, Pollando, Francio, Eŭropo. Unu fikciofilmo, titolita "Seksmisio", ridegis multe.

= 20 koncertoj ĉarmis la orelojn. De Chopin al Jak LE PUIL, tra la Hinda muziko kaj la religia orgeno, sen forgesi rokenrolon. Ni notu, ke ĉiuvespere, ek de la 22a horo, la tutlanda junularo dancadis ĉe la diskoteko "Hybrydy" ĝismaterie...

= La tradician banketon sekvis granda balo ofertita al ĉiuj. Okazanta samtempe en kvar apudaj salonoj, estis inter la kvar orkestroj granda konkursa, kiu rapide iĝis kakofonio. Finfine nur unu ludis... Ĉu estas mesaĝo?... De la Babelturo al Esperanto!

= Konferencoj, eksposicioj, laborkunvenoj de UEA, sesio de E<sup>o</sup>-Akademio, ktp.

= La tradiciaj laborkunvenoj de fakgrupoj, kiuj estis pli ol 50!

Entute la oficiala programo nombris cirkaŭ 190 arangoj sen kalkuli la diversajn ekskursojn. Estis por ĉiuj deziroj, je ĉiuj horoj. Mi povas aserti, ke en Varsovio ĉiu kongresano kapablis riĉiĝi sur la tereno de la kulturo.

# 25ème STAGE PRATIQUE d'ESPÉRANTO PARLE

SAMEDI 7 ET  
DIMANCHE 8 NOV.  
1987

organisé  
sous l'égide  
de la  
FÉDÉRATION  
CULTURELLE  
FRANCE-EST  
POUR L'ESPÉRANTO



"... Je parie qu'il va au  
stage d'espéranto!..."

À "L'ERMITAGE"  
MOULINS-LÈS-METZ  
Rue du Château

avec la  
collaboration active  
du Groupe Esperanto  
de MONTIGNY-lès-METZ  
et Environs  
(G.E.M.M.E.)

Bienvenue à notre 25ème Stage Pratique d'Espéranto Parlé!

Bienvenue à tous les espérantistes de notre région, des régions et pays voisins (Allemagne, Belgique, Luxembourg...), à toutes les personnes désireuses de commencer l'étude de la Langue Internationale, dans une ambiance tonique et amicale!

Un programme particulièrement riche est offert à tous les participants.

## COURS A NIVEAUX MULTIPLES

Cours A1: si vous n'avez aucune notion d'espéranto. Animateur: M. GUILLAUME

Cours A2: si vous êtes "à mi-chemin" d'un cours élémentaire: Animateur: M. COLNOT

Cours B: vous apprendrez à parler uniquement en espéranto. Animateur: M. GREINER

Cours C: "krokodilado" malpermesata! Animateur: M. GROSSMANN

Cours D: Pour les passionnés de l'espéranto... deux thèmes particulièrement attractifs... (voir au verso). Animateur: M. CHERPILLOD (linguiste et historien).

## PROGRAMME

Samedi 7 novembre - jusqu'à 14h45: arrivée et accueil des participants.

14h45/18h30: cours (séquences de 45 minutes et pauses)

18h30/19h30: service de librairie.

19h30: repas en commun

20h30: UN DIAPORAMA RETROSPECTIF DE QUALITE...

... présenté et commenté par Jean-Paul COLNOT: "A travers la vie de notre Fédération"

Dimanche 8 novembre - jusqu'à 8h: petit déjeuner. 8h15/9h: cours (examens éventuels)  
9h15 : départ (facultatif) pour l'église St-Joseph à

MONTIGNY-lès-METZ. Grand-messe bilingue avec participation de la Chorale et de l'Harmonie Municipale. A l'issue de la messe: rencontre dans le Parc de la Salle EUROPA.

= prestation spéciale de l'HARMONIE... 'avec "La Espero"!). Inauguration de la Place ESPERANTO sous la présidence du Maire de MONTIGNY. Vin d'honneur.  
12h30: repas en commun à l'Ermitage.

+ Dimanche après-midi: VISITE GUIDEE (MM. Colnot et Bassot) de la GRANDE EXPOSITION PHILATELIQUE à la Maison pour Tous "Marc Sangnier" à MONTIGNY (8, Allée Marguerite).

Cette exposition sera ouverte également le SAMEDI à partir de 14h. Bureau de poste temporaire (uniquement le samedi 7) avec flamme spécifique. Vente d'enveloppes "1er jour" et de cartes postales spécialement oblitérées.

= Commandes par anticipation à Marthe NAU, 6 Allée Marguerite, F-57158 MONTIGNY.

enveloppe illustrée 1er jour: 8F = paiement à la commande par chèque bancaire ou postal-

carte postale oblitérée le 7: 10F  
(si envoi désiré avant le stage: +3F) FRAIS DE STAGE: Cotisation: 60F (+ 40F pour non abonné à "La 1<sup>e</sup>")  
40F (de 12 à 18 ans) gratuit - de 12

REPAS: samedi soir 46F dimanche midi 52F Boisson comprise. CHAMBRE: 42F (+ 15F petit déjeuner)

# 25a staĝo de parolata esperanto

## "Ermitage" MOULINS lès METZ

7an/8an de novembro 1987

Ermitage St-Jean,  
Rue du Château,

F-57160 MOULINS-lès-METZ

Bonvenon al nia 25a staĝo de "Parolata Esperanto"!

Ni kore invitas ĉiujn esperantistojn (eĉ komencantojn!) en najbaraj regionoj en Francio, Germanio, Belgio kaj Luksemburgio veni en MOULINS-lès-METZ por praktiki la internacian lingvon en AMIKA kaj STIMULA etoso!

Estas antaŭviditaj 5 kurs-gradoj:

Kurso A1 por tuj komencantoj

A2 por jus komencintoj...

B por tiuj, kiuj finis 1a-gradan kurson

Kurso C la partoprenontoj fajne poluros

siajn konojn

Kurso D Elstara prelego kaj diskut-rondo!

Animos André CHERPILLOD el PARIZO.

Temo de la kurso D: La internacieco de la gramatikaj vortoj en Esperanto. Kio estas la aglutinaj lingvoj, kaj ĝis kia grado Esperanto estas aglutina?  
Kiu estis Jana d'Arko kaj kiel ŝi mortis?

GVIDANTOJ: kurso A1: Srº GUILLAUME, A2: Srº COLNOT, B: Srº GREINER, C: Srº GROSSMANNPROGRAMO

= Sabaton, 7an de novembro - ĝis 14h45: Akcepto de la staĝanoj. 14h45/18h30: kursoj (kun pažoj!) 18h30: libro-servo. 19h30: vespermanĝo. 20h30: ELSTARA DIAPORAMO pri TRA LA VIVO DE NIA FEDERACIO. Komentos Jean-Paul Colnot.

= Dimanĉon, 8an de novembro - ... ĝis la 8a: matenmanĝo. 8h15/9h: kurso. 9h15: forveturo (eventuala) al la preĝejo St-Joseph en MONTIGNY-lès-METZ: dulingva alta Meso. Partoprenos floro kaj urba muzikantaro. Post la meso: en parko de la "Salle EUROPAL" ... eta koncerto de la muzikantaro (kun "La Espero!"), Inaŭguro de la "Placo de ESPERANTO" fare de la urbestro de MONTIGNY-lès-METZ. Honorvino. 12h30: komuna tagmanĝo.

... ek de la 14h: GVIDATA VIZITO de la Filatela Eksposicio kun Esperanto-Fako. ("Maison pour Tous" Marc SANGNIER en MONTIGNY-lès-METZ, 8 Allée Marguerite). Gi ankaŭ estos malfermata la Sabaton 7an, posttagmeze; funkciros punkta poštovicejo. Vendeblos poštaj memorajoj. Ilin vi povas mendи ek de nun al:

Marthe NAU, 6, Allée Marguerite, F- 57158 MONTIGNY-lès-METZ

= ilustrita koverto "unua tago de la specifa stampo" 8 FF pagebla anticipe per ĉeko bildkarto stampita de la aludita poštovicejo 10 FF 10 FF sendkosto (ne registrite) 3 FF

**KOSTOJ** (po persono) ALIGKOTIZO: 60 FF (+ 40 FF: abono al LA INFORMILO por ne-abonantoj kaj por ne-federacioj). 40 FF por gejunuloj (12/18 j.). senpage sub 12 J. MANGOJ: 46 FF (vespermanĝo, sabate). 52 FF (tagmanĝo dimanĉe). trinkajo enten. TRANOKTADO: 42 FF + 15 FF (matenmanĝo). Unu aù du-lita ĉambro, varma akvo.

distranĉu aù kopiu

**ADHESION**

BULLETIN et CHEQUE

ALIGILON kaj ĈEKON

à envoyer à vi sendu al

Marthe NAU 6, Allée Marguerite F-57158 MONTIGNY-lès-METZ
--

M. Srº  Mme Sinº 

NOM Nomo

Prénom Antaŭnomo

ADRESO Adreso

Jour et heure d'arrivée Horalveno

par train   
trajnepar voiture   
veturileJe réserve lit(s) en chambre à 1 lit  à 2 lits  (nuit du 7 au 8 nov.)  
mi rezervas lito(j)n en 1-lita ĉambro en 2-lita de la 7a al la 8aRepas: samedi soir  dimanche midi  Cours choisi: A1  A2  B  C   
manĝoj sabate vespero dimanĉe tagmeze elektita kurso D 

Je désire passer un examen: 1er degré 2ème degré Kapableco

Abonné INFORMILO: oui  non  Abonanto al LA INFORMILO jes  ne Avant le  
24 Octobre  
1987

En la jubilea jaro 1987 post la UNIVERSALA KONGRESO en VARSOVIO okazis dum la unua semajno de aŭgusto la aranĝo "100 jaroj de Esperanto-kulturo" en ZAGREBO (Jugoslavio).

Zagrebo estas ankaŭ la urbo, kie jam de pluraj jaroj okazas la Pupteatra Internacia Festivalo, mallonge PIF, kaj ĝi estas intime ligata al Esperanto. En 1987 la 20-a PIF havas je sia repertuaro 21 ensemblojn kun 22 prezentaĵoj. Pluraj el ili parolas en Esperanto. Tial tiu aranĝo "100 jaroj de Esperanto-Kulturo" parte kombiniĝis kun la 20-a PIF, tiel ke la 5 unuaj tagoj de PIF kun prezentaĵoj en Eº kongruas kun la 5 lastaj tagoj de la citita aranĝo. Inter la diversaj pupteatraĵoj rimarkindas:

"La rusa salo" Skomoro el TOMSK (Sovetunio).

"Foira Pukkomedio" Hungara Stata Pupteatro el BUDAPESTO.

"La Sorĉa Krusto" Infangrupo "Grilo" el Hungario.

"Kandido" André MOREL, Francio.

"Pirotekniko" sen vortoj el STUTTGART (FRG).

Sed kompreneble ne okazis nur pupteatraĵoj, ni ankaŭ havis la eblecon ĝui tre interesan koncerton kun la solena malfermo. apartan bonan tepertuaron havis la kanada kantistino Joelle RABU. Si sukcesis per sia mirinda voĉo kaj persona ĉarmo ravi la aŭskultantojn. La internacia simpozio havis kiel temon "La lingvaj problemoj en internacia komunikado". Inter la prelegantoj estis Claude PIRON, Ŝin-Ičiro KAWAMURA, Li SHIJUN. Klaus SCHUBERT prezantis kiel Esperanto povas utili kiel pontlingvo por per-komputora tradukado kaj li iom klarigis kiel funkcias la prilabora sistemo DLT, kiu ĝuste uzas Esperanton kiel pont-lingvon kaj kiun la nederlanda registaro nuntempe financas.

Dum la literaturaj programoj verkistoj parolis kaj prezantis siajn verkojn, oni povis aŭdi P. Thorsen, T. Sekejl, C. Piron, S. Štomec kaj aliajn. Rimarkindaj kaj interesaj teatraĵoj estis "Pikniko sur batalkampo" de Bulgara Eº-Teatro el SOFIJO kaj "Songo de ridinda homo" de Leningrada Eº-Teatro el Sovetunio. Oni ankaŭ spektis kelkajn filmojn pri TEJO-Kongresoj, pri turismo, pri la "zagrabata metodo" (instruado de Eº), pri kongresoj, ktp. Interesaj filmoj estis "Analfabeto" (filmita teatraĵo), "En Eŭropo ie" (infanoj post la dua mondumilito vagadas ie en Eŭropo).

Do entuta tre ampleksa kaj alloga programo, kiu okazis en diversaj lokoj en Zagrebo. Sed ĉefaj lokoj estis la teatrejo kaj la konferencejo, kiuj distancis je 10-minuta piedirado. Tial oni sentis la mankon de komuna ejo, kiel kongresejo dum UK. Necesis do ĉutage iri de unu loko al alia por ne maltrafi programeron. Tre verŝajne por tiu aranĝo oni atendis kelkcentojn da partoprenantoj, sed bedaŭrinde ĉestis nur iom malplimalpli ol 200. Tiom abunda kaj alloga programo meritus tutcerte multe pli da Esperanto-publiko.

Dum la tuttaga ekskurso oni vizitis la famajn akvo-falojn kaj

Dum la tuttaga ekskurso oni vizitis la famajn akvo-falojn kaj lagojn de PLITVICE. Sed bedaŭrinde preskaŭ dum la tuta tago pluvis kaj pluvegis. Multaj suferis pro tio, pro la malsekeco, la malvarmo, atendado sub la pluvo por atingi la ŝipon aŭ la elektran aŭtobuson. Nur Afrikanoj sukcesis malgraŭ la pluvo danci kaj kanti en Esperanto! Kompreneble tiam la pejzaĝo aspektis malpli alloga, kvankam temis pri unu el la plej belaj natur-regionoj de la mondo.

A. GROSSMANN

\*\*\*\*\*

#### NEKROLOGO

En RASTATT, mortis la 26an de junio 1987, samideano Horst FISCHER. Konata pro sia senlaca agado en BA-V-E-LO, li havis multajn geamikojn en nia Federacio. Plej sincere ni kondolencas lian edzinon, lian filinon Simone kaj lian tutan familion.

Ni ankaŭ eksciis pri la forpaso de André RIBOT. Siatempe senlaca vojaĝanto por informi pri esperanto -li vizitis multajn lernejojn en nia regiono- li fariĝis verkisto kaj eldonisto de valoraj lerno- kaj informlibroj. Multaj el ni ŝuldas al li sian "Kapablecon". Ni sincere kondolencas lian familion.

Apenaù finiĝis la someraj ferioj, kaj jam ni staras ĉe la komenco de la nova lerno-jaro, kiu alportas al la membroj de la Eº-Grupo de MULHOUSE, laboron kaj esperon.

Sed antaù ol paroli pri laboro, ni menciu, ke dum ĉi-tiu someraj ferioj pluraj anoj de nia grupo ĝuis gravajn Eº-aranĝojn, nome 4 el ni partoprenis la Universalan Kongreson en VARSOVIO, 4 ankaù ĉeestis la aranĝon en Zagrebo / "100 jaroj de Eº-Kulturo" /, kaj laste 2 vizitis la Eº-Centron en LA CHAUX-DE-FONDS.

Tuj en komenco de septembro, la 5/6ajn, ni partoprenis en MULHOUSE "Forumon de Asocioj". Ni disponis pri loko 4 kaj 3 metrojn longa kaj larĝa, sur kiu ni starigis la ekspozici-panelojn de nia Federacio. Kompreneble ni ankaù montris librojn, revuojn, afišojn, ni disdonis propagandilojn pri esperanto, pri la per-koresponda kurso, ni vendis verdajn libretojn "Une approche...". Kvankam la publiko ne estis tiom multnombra, ĝi sajnus interesiga pri la lingvo kaj petis multajn informojn.

Ni aparte substrekis, ke la 12an de oktobro 1987 komenciĝos Eº-kurso en la "Popola Universitato" de Mulhouse, kaj tio cetere alportis plian seriozecon al nia afero. Efektive ni sukcesis (post foresto dum 2 jaroj) refoje enkonduki Esperanton en la abundan programon de la P.U. Tio per si-mem ankaù estas propaganda, kaj tiu forumo ĝusta-tempe okazis por pli emfaze informi la publikon pri tiu kurso. Ni do esperas, ke sufiĉe da personoj enskribiĝos al ĝi. Cetere tiu kurso estas pagenda kaj kostas 480F por 1h30 x 20, do same kiel por aliaj lingvo-kursoj.

A. GROSSMANN

\*\*\*\*\*

## NANCY

La nova laborjaro rekomencaj tre frue, jam la 2an de septembro per kunveno, al kiu partoprenis 9 personoj. Laŭ modeloj tre lerte aranĝitaj de P. Denis, ni eldonis 2500 flugfoliojn pri Eº kaj pri la kursoj en Nancy, kaj 500 novajn afišojn pri la perkoresponda kurso.

La vesperaj kursoj por komencantoj rekomencaj nur la 14an de oktobro (je la rekomencaj de la lernjaro en la Universitato), sed la perkorespondkurso jam nun funkciias. Nia vespera kurso de preparo al "Kapableco" okazos denove unufoje monate (ek de la 7a de oktobro). Niaj ceteraj kursoj dependas de eventualaj aliĝontoj al la vesperaj kursoj por komencantoj.

En EST REPUBLICAIN (Nancy) laboras nun Finº Golder, kiu eklernis Eºn en Besançon kaj jam verkis plurajn artikolojn pri la lingvo en sia gazeto. Mi provis kontakti la journalinon de Radio-France-Nancy, kiu intervjuis min en aprilo, sed intertempe ŝi mala-peris al iu "libera" radio. Lokaj komunikoj aperis en la naciaj gazetoj, sed mi ne scias, ĉu la komuniko sendita al Radio-France estis disaŭdigita?

Nun ni preparas la 3 prezentojn de la Federacia Ekspozicio, kiuj okazos sinsekve ek de la 1-a de septembro en Socia Centro, en la Urbo-Domo kaj en MJC Philippe Desforges.

J.-P. COLNOT

\*\*\*\*\*

## PRI NIA PERKORESPONDA KURSO

En la lasta INFORMILO aperis la nomoj de 8 gelernantoj, kiuj finlernis ĉi-jare METODO-n 11. De post tiom 4 pliaj personoj atingis la finon de la kurso:

Srº Laurent MANGENOT - 57157 MARLY, gvidita de Srº Thibias = Srº Claude FIEGEL - 67150 ERBSTEIN, gvidita de Srº Wick = Sinº Joelle FAYNOT - 21300 CHENOYE, gvidita de Finº Roux = Srº Jean SAUTILLET - 51100 REIMS, gvidita de Srº Guillaume. Gratulojn al ĉiuj!

El 35 aliĝintoj, 12 ĝis nun finlernis "M 11", kaj el ili 10 mendis "M 12". Unu finlernis "M 12" ĝis nun. Espereble pluraj gelernantoj ankoraŭ finlernos M 11. (Lastjare, 14 el 39 finlernis ĝin). La kotizo al nia unuagrada kurso ne ŝanĝiĝos por la nova lernjaro: 165 F kun nur la libro, 220 F kun plie la kasedo.

Pro la bela vetero ni ne aperigis ĝis nun komunikojn pri la kurso, sed tamen jam aliĝis 2 novaj lernantinoj. Se vi deziras reklami pri nia PKº, novaj afišoj, flugfolioj kaj cirkuleroj estas je via dispono.

J.-P. COLNOT

\*\*\*\*\*

Je la sojlo de la nova lern-jaro niaj "militantoj" kaj "prozelitistoj" arde volos pluporti la "verdan torĉon"! Evidentiĝas, ke por progresigi esperanton, ĉiu devas peni eviti mispašojn... Thomas BORMANN, miaopinie, aperigas interesoplenan argumentaron, kiun ni invitas vin atente pripensi...

Thomas Bormann (FR Germanio):

## Ne hieraŭ aŭ postmorgaŭ, sed hodiaŭ!

"**L**a esperantistoj fariĝis lingvo-sekto." Tiel la renoma ĵurnalo *Die Zeit* el FR Germanio karakterizis la Esperanto-movadon en artikolo aperinta en februaro ĉi-jare. Per tiu jugo la aŭtoro kontribuis treni la publikan opinion en malopportunan angulon: Esperantistoj postkuras iun idealon kiu antau cent jaroj intencis konkeri la mondon sed kiu malsukcesis; tamen nun manpleno da idealistoj pene sed vane baraktas kontraŭ la realaj cirkonstancoj de la nuntempo.

Prioritata tasko de la Esperanto-movado devas esti, eviti la disvolviĝon de tiaj misvidaj karakterizo. Tion ĝi povas atingi nur per saĝa informa laboro. Eraro estus ekzemple propagandi la "finan venkon" de Esperanto, post kiu la tuta mondo pacigus en harmonio. Komuna lingvo ne solvas ĉiujn konfliktojn inter la popoloj. Ĝi nur ofertas rimedon interkompreniĝi. Se la Esperanto-movado taksas sin tro serioza, ĝi riskas, ke la publiko absolute ne plu takisas ĝin serioza, sed sekteca.

Sektojn oni povus karakterizi jene: Ili restas daŭre malgrandaj, havas opinion aŭ kredon diferece de la regula, kaj pretendas posedi la kompletan veron. La adepto de sekto volas konvinki ĉiun ajn individuon pri la ĝusteco de siaj ideoj. Paraleloj al la Esperanto-movado ŝajnas evidentaj, almenaŭ supraje vidite — *kaj la publiko kutime nur supraje aŭdas pri Esperanto*.

En ĉi tiu artikolo mi do traktos kelkajn aferojn, kiuj havas — aŭ povus havi — grandan efikon sur tiu supraĵa aspekto, ĉu negativan, ĉu pozitivan.

**A**l la mito de "fina venko" aldoniĝas akcesorajoj de la Esperanto-movado kiel la flago aŭ la himno, kiujn la ekstera publiko povus miskompreni kaj konsideri sektecaj. Ankaŭ la personkulto ĉirkaŭ Zamenhof, jen kaj jen spertebla en kelkaj Esperanto-grupoj, malbone impresas ĝe la publiko. Foje iuj nomas Zamenhof eĉ "kreinto" de Esperanto tiel donante al li diecajn trajtojn. Zamenhof ne kreis Esperanton, li iniciatis ĝin. Post 1887 Esperanto plu evoluis dum tuta jarcento. Ĉefe tiu jarcento da vivo kaj ne la Unua Libro igis Esperanton esti lingvo.

Per tio mi ne intencas malrespekti Zamenhofon, nur averti pri la efiko eksteren informante pri Zamenhof, ĉar — kaj jen ripetiĝas la argumentado — se la Esperanto-movado prezentas la personecon de Zamenhof tro glora, serioza, la publiko ne plu taksas lin serioza sed konsideras lin la eks-guruo de tiu Esperanto-sekto.

**L**a slogan "Esperanto — dua lingvo por ĉiuj" ne taŭgas por la ekstera informado. La slogan entenas absolutan postulon: ke ĉiu ajn individuo lernu Esperanton. Sed ekzistas multaj homoj, kiuj ne vidas neceson por si lerni Esperanton, eĉ se ili kutimas vojaĝi eksterlanden. Pensi ekzemple pri la milionoj da turistoj el Germanio, kiuj ĉiu-somere vojaĝas al la Mediteraneo por ferii dum tri semajnoj. Tiuj turistoj plejparte ne serĉas kontakton kun fremdaj kulturoj kaj popoloj. Se ili estas ekzemple en Barcelono, ili ne volas pridiskuti la vivon kun la tieaj civitanoj. La turisma industrio ofertas al siaj klientoj abundajn servojn, por ke eĉ en fremda lando oni "sento sin hejme": kelneroj parolu germane, oni provizu germanajn manĝojn, kaj en la hotelo estu aĉeteblaj germanaj gazetoj. Verŝajne tiuj turistoj eĉ ne konscas, ke ili troviĝas en la kataluna parto de Hispanio. Ili volas simple ripozi, ĝui la sunon kaj la maron. Eble ili ankaŭ ŝatas konatiĝi kun aliaj homoj, sed preferas tiujn estu aliaj turistoj el Germanio.

La Esperanto-movado devas toleri tiujn homojn, kiuj respondas al niaj argumentoj: "Viaj internaciaj kontaktoj estas imponaj, sed tio ne interetas min. Mi ne volas lerni Esperanton." Klopodi konvinki tiujn homojn signifus vaina laboro, kaj cetere la Esperanto-movado aperus kiel grupo da misiistoj.

**S**ekto kutime havas iun ĉefan malamikon, ion aŭ iun malbonan, diablan. Ankaŭ ĉi-kampe ni trovas parallelon en la Esperanto-movado: la agitadon kontraŭ la angla lingvo. Ja estas danĝere por malpli grandaj kulturoj, se iu lingvo dominas la tutan mondon kaj influas la vortrezorojn de ĉiuj aliaj lingvoj. Sed estas nek la zorgo nek la celo de Esperanto faligi la anglan.

La roloj de la angla kaj de Esperanto ne estas kompareblaj. La angla servas kiel lingvo de komerco kaj kiel helpingvo por turistoj. Esperanto havas alian funkcion: Per ĝi eblas sendiskriminacia komunikado je alta nivelo. Pro sia facileco Esperanto rapide donas al la parolanto la eblecon diskuti eĉ komplikajn temojn.

Esperanto ne havas ŝancon nuntempe enpenetri grand-skale la sferojn kie dominas la angla. La angla estas firme enradikiĝinta kaj ĉiu-tage pli solidigas, ĉar ĝie sur la globo milionoj da infanoj lernas ĝin, dum Esperanton oni instruas nur escept-okaze. Tial la postulo de la Esperanto-movado enkonduki Esperanton por ĉiuj internaciaj rilatoj estas taksata nerealisma.

Ankaŭ ĝenerale per argumentado kontraŭ la angla la Esperanto-movado ne rikoltos multe da subteno. Almenaŭ en nordokcidenta Eŭropo pli kaj pli enradikiĝas la ĝeneralaj imagoj, ke la angla estas la mondlingvo, parolata "preskaŭ ĉie". Dum enketo 44 procentoj de la civitanoj de FR Germanio jesis al la demando "Ĉu vi parolas la anglan?" Kvankam tiu jeso en multaj kazoj certe signifas nur, ke la koncerna homo iom balbutas la anglan por eksterlande trovi la vojon al la stacidomo, la Esperanto-movado ne forprenas de tiuj homoj la iluzion ke ili parolas la anglan. Dum jaroj tiuj homoj lernis la anglan en la lernejo. Ili ne ŝatas aŭdi de la Esperanto-informantoj, ke tiu lernado estis vana.

Kiam iu ĵurnalisto venas al ni kun la fama demando "Kial ne la angla?", ni respondu, ke la du lingvoj havas malsamajn funkciojn en la nuntempo. La angla ĉefe utilas por orientiĝi en aliaj landoj, demandi pri la vojo; per Esperanto eblas pli profundaj personaj diskutoj kun homoj el multaj diversaj landoj; diskutoj je sendiskriminacia nivelo, ĉar por neniu Esperanto estas la gepatra lingvo.

**L**a informa laboro de la Esperanto-movado devas celi, ke la ekstera mondo konsideras nin funkcianta internacia kultura organizajo. Ni devas rompi nian fermitecon, ne aperi kiel movado de antauhieraŭ, kiu postkuras iujn idealojn el la jaro 1887. Ni same ne aperu kiel movado de postmorgaŭ, kiu konstante revas pri la paradiza mondo post la "fina venko".

Ni devas aperi kiel movado de hodiaŭ; movado, kies anoj tenas vastajn internaciajn kontaktojn, interesiĝas pri fremdaj kulturoj, ŝatas vojaĝi; movado kun praktikaj valoroj hodiaŭ. Kiel delegito de UEA aŭ kiel gastiganto de Pasporta Servo, ĝuas praktikajn valorojn de Esperanto ankaŭ tiuj, kiuj ne disponas pri la tempo kaj mono por vojaĝi. Pliajn eblecojn je internaciaj kontaktoj proponas respondado, legado kaj la Esperanto-radiostacioj.

Pri ĉiu tiuj praktikaj valoroj la Esperanto-movado fieru. Sur tiuj valoroj la movado bazu sian memkoncion. Ni montru al la publiko la funkciojn de Esperanto. Ĉiu eksterlanda gasto vizitanta vin estas pruvo pri la funkcio de Esperanto. Tio impresas jurnalistojn. Se jurnalistoj propra-orele spertas Esperanton, ili rimarkas ĝian aktuan taŭgecon kaj ne ekmokos pri ĝi.

La Esperanto-movado aperu kiel organizaĵo, kiu proposas siajn servojn — internaciajn kontaktojn — al la publiko; same kiel Zamenhof proponis sian lingvan projekton al la homaro.

**A** ĉi la supre menciiatj aktualaj valoroj de Esperanto, kiuj solidigis en la unua jarcento de la lingvo, necesas aldoni novajn taskojn. Tiel Esperanto aperos eĉ pli alloga.

Ambicia, sed tre grava kaj realisma nova tasko estus respondi al la deziroj de Esperanto-studantoj en la Tria Mondo. Ili ŝatus uzi Esperanton por siaj fakaj studoj. Por tio necesus lernolibroj kaj scienteknika literaturo en Esperanto. Tion postulis d-ro M.H. Saheb-Zamani, elstara irana intelektulo, en intervjuo aperinta antaŭ dek jaroj

en tiu ĉi revuo. Li diris: "Mi alvokas la science kaj kulture riĉan okcidenton pliampleksigi finfine scienteknikan literaturon en Esperanto anstataŭ forverŝi la tempon por intelektulaj dispuoj." Saheb-Zamani per tio montris vojon, kiel "per Esperanto liberigi de la scienteknika malriĉeco en la Tria Mondo". Tamen, pasis jardeko depost la vortoj de Saheb-Zamani, kaj nenio okazis. Kvankam en majo 1980 la revuo *Esperanto* raportis, ke en Irano 675 geinstruistoj lernas Esperanton, la kolekto de scienteknikaj libroj en Esperanto aspektas same mizera kiel antaŭ dek jaroj.

Elezistas multaj scientistoj de ĉiuj fakoj en la Esperanto-movado. Devus esti eble kunordigi iliajn kapablojn kaj eldoni scienteknikan literaturon. Tio estu unu el niaj grandaj taskoj por la dua jarcento. Tiel Esperanto ofertus unu plian praktikan servon al la mondo, kiun oni fieras povus prezenti al la publiko.

Resume jen konsilo al la Esperanto-movado: En sia informa laboro ĝi ne elstarigu, kiom **povus valori** Esperanto (estigonte dua lingvo por ĉiuj), sed kiom ĝi efektive **jam valoras**.

*esperanto 1987 julio-aŭgusto / 145*

## Esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj



*moi... j'aime parler  
espéranto...  
alors, je participe!*

FAMILIA SEMAJNO DUM PASKO 1988a

\*\*\*\*\*

GERMANA ESPERANTO-ASOCIO invitas precipe familiojn al la "4a Printempa Semajno Internacia", kiu okazos je 1988-03-29/04-05 (paske), en la montaro Eifel, sude de AACHEN kaj KÖLN, kaj tute proksime al Nederlando, Belgio, Luksemburgio kaj Francio.

La unuan fojon, GEA ĝuos subvencion, tiel ke la kotizoj por sep plenaj tagoj estas tre malaltaj: infanoj pagos 50 GM, plenkreskuloj 130 GM.

La programon konsistigas Esperanto-kursoj, slojdado per ledo, vitro kaj papero, kantado, dancado, prelegetoj kaj multaj ekskursoj en la tutan regionon. La celo estas, praktiki Esperanto-kulturon en internacia rondo de ĉiuaguloj. Ankaŭ paroj kaj unuopuloj sen infanoj estas bonvenaj, se ili ŝatas familiecan etoson. Ĉar estas nur 50 lokoj, petu tre baldaŭ aliĝilon kun pluaj informoj de:

Edwig FISCHER

Gustav-Adolf-Str. 2a,

D-4418 NORDWALDE

4/ajn de decembro

30a KULTUR-SEMAJN-FINO de SEL

Prelegos Drº LAPENNA!

Inf.: SEL, Schulstraße 30,

D-6601 SAARBRÜCKEN-SCHEIDT

**FESTIVAL DU THEATRE ET DE LA CHANSON EN ESPERANTO**

**FESTIVALO DE LA TEATRO KAJ DE LA KANZONO EN ESPERANTO**

=====

28/29ajn de novembro 1987

**ADRESO:** A.A.P.M. 13, Rue Victor HUGO, F-92130 ISSY-les-MOULINEAUX  
Cirkaùurbo de PARIZO - Metro: stacio "Corentin-Celton"

=====

**PROGRAMO**

**Sabate, 28an de novembro:**

- 15h00: JEFO-Spektaklo
- 17h00: "TESPA" kaj "Krizalido" prezentos novan teatraĵon.
- 20h30: Kanta Spektaklo de Claude PIRON.

**Dimanĉe, 29an de novembro:**

10h00: Cent jaroj de ESPERANTO-Literaturo. Forumo de verkistoj. Prezidos Profesoro Georges WARINGHIEN.


12h00: Bufedo.

14h00: "Kaledojskopo"... Ĉu vi konas ilin?...

15h30: "PERSONE", Skandinava Rok-grupo.

17h00: Varieta kaj kanta spektaklo kun partopreno de..

William AULD, Jack LE PUIL, Stefan MACGILL



=====

**KOSTOJ**

**Unu spektaklo:** 35 FF    **Ses spektakloj:** 160 FF

**Speciala prezo por membroj de UFE, individuaj membroj de UEA, eksterlandanoj:** 140 FF

**Forumo de verkistoj:** senpage.

**Bufedo:** prezo ankoraù ne konata sed ne alta.

**Hotelĉambro** por unu nokto: 110 F (por unu aù du personoj) kun lavkuvo kaj bideo; proksime de la festivalejo.



**A L I G I L O**

Priatentu!... Bonvolu sendi ĝin al la ĉi-suba adreso:

UFE-Festivalo  
4bis, Rue de la Cerisaie,  
F-75004 PARIS

Mi partoprenos la 5an Festivalon en PARIZO.  
Bonvolu rezervi por mi biletaro(j)n  
por la 6 spektakloj.  
Mi antaŭpagas per  
je la nomo de UFE.

**NOMO, Antaŭnomo:**

**ADRESO:**

Mi estas \*(ne estas) aktiva membro de UFE - individua membro de UEA  
Mi intencas (ne intencas) partopreni la bufedon dimanĉe.

Bonvolu rezervi por mi ĉambron por jenaj noktoj:

Atentigo: la rezervo validas nur kun la antaŭpago de la tuta sumo (110F nokte por ĉiu ĉambro)

Farenda kiel eble plej rapide... Aktivaj JEFO-anoj estos senpage gastigitaj de parizaj JEFO-anoj.

trastreku tion,  
kio ne validas

Dato:

Subskribo:

INVITO AL  
INTERNACIAJ VINTROFERIOJ  
en Domo Montana/St.Magdalena/Gsies  
—— Sudtirolo = Italo ——

\*\*\*\*\*

Tempo: la semajno 27/12/87 = 03/01/88



2a semajno 03/01/88 = 10/01/88

(eblas partopreni ambaù semajnojn)

Ceestantaro: Ĉiuaguloj = en la unua semajno ĉefe familioj kun ĉiuagaj infanoj, en la dua semajno ĉefe gestudentoj.

Domo Montana enhavas 30 litojn en 2/4 litaj ĉambroj kun dušejoj kaj nece-sejoj.

Programo taga: ferii lauvole, migradi, skimigradi, alpe skii. Rekte apud la Domo estas du liftoj. 30 k°jn for situas BRUNECK kun la granda skiejo "Kronplatz".

Programo vespere: post komuna manĝado 2 horojn, jenaj aranĝoj:

1= E°-kursoj por komencantoj kaj progresantoj ĉiuŝtupaj lau "rekta metodo".

2= Prezentadoj kaj diskutadoj en E° pri jenaj temoj:

Elektitaj temoj al la biblio = Feltolaboroj = Tai Chi = Lumbildo: kio okazis en la jubilea jaro = La Diabla Cir-klo, organizo kaj efikeco de la E°-movado.

Ni serĉas aliajn temojn ĉefe el la kadro de religio kaj naturprotektado. Preteco partopreni vespere en unu el la nomitaj kursoj estas antaŭkondi-ĉo de la partoprenado.

Prezoj (cio enkluzivita) Unua/dua semajno:

Plenkreskuloj: 300 GM / 250 GM

Gelernantoj, studentoj, metilernantoj, senlaborantoj: 250 / 200

Infanoj 7-12 j.: 180 / 130

Infanoj ĝis 6 j.: 80 / 40

Petu aliĝilon (antaŭ la 1987/11/1) ĉe:

Eki WOITE  
An der Kirche 33,  
D-6115 MUNSTER/DARMSTADT

\*\*\*\*\*

**Dinamisma Roterdamo,  
la plej granda havenurbo en la mondo,  
atendas vin por la 73a Universala Kongreso en 1988!**

**Venu kunkonferti la 80an datrevenon de UEA  
en la ĉefurbo de la Movado!**

\*\*\*\*\*

Pri la 72a UNIVERSALA KONGRESO - CENTJARA JUBILEO - VARSOVIO 1987...

Ĉu ŝpuroj de puĉo?...

"Okaze de nia Federacia Kongreso en MONTIGNY-lès-METZ, Srº Walter Zelazny longtempe parolis pri la puĉo de la pola registaro kontraŭ la libere elektita estraro de Pollanda Esperanto-Asocio. Anstataŭigita de ŝtataficioj, la skipo cedis kaj rifuzis, signe de protesto, partopreni al la preparado de la 72a Universala Kongreso... La simulaĉo de elektoj en oktobro 1986 konservis ĉe la estraro de PEA nur membrojn de la Partio kaj eĉ membrojn de la Polico..."

La fruktoj estis dignaj je la arbo: iu fiasko organizita!

- 1= Ne estis rendevuo-tabulo; ĉiu partopreninto al kongresoj ja scias la fundamentan rolon de tiu-ĉi tabulo por realigi renkontiĝojn, la ĉefa celo de kongresoj.
- 2= La granda honor-salono estis tro malvasta. Necesis dividi je du grupoj la sesmil kongresanojn. Bedaùrinde, ĉar estas vere la samtempa kuniĝo de ĉiuj, kune kun, kiu donas al la malfermo la solenecon, kiu eltiras larmojn el la okuloj...
- 3= Inverse prezentitaj estis la planoj de la kongresejo. Tio-ĉi kreis ampleksan malordonkaj grandajn malfacilaĵojn por renkontiĝi.
- 4= En preskaŭ ĉiuj giĉetoj troviĝis dejorantoj, kiuj rare parolis esperanton. Fakte ĉiuj veteranoj paŭtis la registaran skipon, kiu responsis pri la aranĝo de la kongreso.
- 5= Artefarite mankis sidlokoj en la diversaj spektaklejoj. La interesigaĵoj devis longe vicumi por ricevi biletojn, kiuj permesos aliri duonplenajn vastajn lokalojn...
- 6= Tro malvastaj estis la kinejoj, en kiuj ĉiu povis tute libere eniri por rigardi popularajn filmojn; sekve estis granda malordo kaj longa atendo-vico.
- 7= Ekskursoj malbone preparitaj malkontentigis multajn partoprenantojn.
- 8= Antaŭpagitajn vizitojn de la reĝa kastelo en Varsovio la interesotaj ne efektivigis Tamen kelkaj kongresanoj eniris la kastelon sen antaŭa rezervado.

Vere, la salajra burokratismo elmontris ankoraŭ unufoje, ke neniam ĝi anstataŭos la entuziasmon de propravolantoj, kiuj kredas je ilia agado kaj laboras por idealo de frateco kaj justeco."

F.-X. GILBERT  
\*\*\*\*\*  
BAR-le-DUC

"... En sia franclingva artikolo pri renkontiĝo en Frejburgo, Bernardo AUNIS notas la malamajn reagojn de kelkaj regionistoj pri Esperanto. Kiel li skribas, temas nur pri kelkaj homoj:

Eble interesos la legantojn de LA INFORMILO scii, ke inter homoj, kiuj aktivas por la respekto al minoritataj kulturoj, troviĝas ankaŭ esperantistoj. Ilia gazeto nomigas "Etnismo".

Jacqueline LEPEIX  
STRASBOURG

\*\*\*\*\*

DUM LA TUTA JARO...

ELSTARAJ STAĜOJ KAJ KULTUR-FERI-SEMAJNOJ



EN... KULTURA CENTRO ESPERANTISTA  
DE LA CHAUX-DE-FONDS (SVISLANDO)

Petu tre detalan programon 1987 al

K.C.E., PF 771, Postiers 27, CH-2301 LA CHAUX-de-FONDS .

"Tiu, kiu nur unu fojon vizitis K.C.E. ne povos ne reveni!..."  
- Li, si, mi... ni ĉiuj!-

Bona ideo por viaj finjaraj festoj... 26 decembro - 3 januaro: VINTRO-FERIADO!...  
PROMEN-SKIADO, PRELEGOJ, LINGVO-PERFEKTIĜO... Petu la detalan informilon!



#### HORIZONTAL E

1 murmureti - surdigi. 2 tualetaĵo - egala al 90 - prepozicio. 3 kiun oni povas direkti - germana regiono (r). 4 adverbo antaŭ nombro - dika birdo (r) - kovri, tegi. 5 skapi kampon (r) - brilkolora birdo - ĝi trapikas la ŝelon (r). 6 fermilo - resti nenion farante (r) - sufikso. 7 serpento (r) - ĝi fiksas la planton - posesiva. 8 senkolora gaso (r) - spicita engraulo (r). 9 instrua parolo (r) - malmolaĵo de la haŭto - interjekcio. 10 etendita aranĝo - diseretigi. 11 politika unu iigo de ŝtatoj (r) - snureto - eluzi (r). 12 cefalopodo (r) - amfibolo aŭ pirokseno - malpurajo (r).

#### KRUCVORTENIGMO

##### VERTIKALE

1 demenco (r) - metala najlego (r) - sufikso. 2 maldika metalo (r) - longbeka birdo - konjukcio - membro de grupo. 3 senrajte uzi (r) - malnova mezurunuo (r). 5 skribajo (r) - fari - etendaĵo da akvo (r). 6 longa antikva vesto (r) - staŭdo (r) - prepozicio - onklo (r). 7 maljuna (r) - pensi, senti (r) - inklino. 8 bati grenon (r) - trinkvazo (r) - laŭtempa rivero (r). 9 karto ĉe la romaj domoj - por ĉirkaŭigi - parto. 10 islama respubliko (r) - diversforma ilo (r) - kvanto. 11 konsenti - virnomo. 12 farbo (r) - drinkejo (r).

#### SILABENIGMO

Pere de la ci-subaj alfabeto ordigitaj "silaboj", malkovru la vortojn, kies difino trovi gas dekstre. La du krucunitaj kolumnoj, vertikale legataj, elformas proverbon.

ab ad ad ajo ak bli ca ci cir eū fe id iko im io iro is it ja ke ko la lo mis mo mo mo naù nda ni nio no no no olo on op or or pa per ra re so su ti to

1	+ - - + -	ne havanta apartan kompetecon
2	+ - - + - -	severe riproĉi
3	+ - - + - -	senigita je vidkapablo
4	+ - - + - - -	anonima informo
5	+ - - + - -	simio
6	+ - - + - - -	respondo neeariva
7	+ - - + - -	kornea inflamo
8	+ - - + - -	profundego
9	+ - - + - -	orientulo
10	+ - - + - - -	germana nilono
11	+ - - + - -	alproprii al si
12	+ - - + - - -	longkrura birdo
13	+ - - + - - -	ne valoras originalon
14	+ - - + - - - -	stilfiguro
15	+ - - + -	gamintervalo
16	+ - - + -	helena sorĉistino
17	+ - - + - -	konstellacio



#### SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ (n°58)

Krucvortenigmo: senkremigita ukaz opa or sol pruo tombak nu rak sako ej io edr nord lasi nia egala atel ĉit rido uzi lu ergo ume rokeg ring bolet on tenon fotelo vojo nepre ran ir smeraldo di

Silabenigmo: "Urson al mielo oni ne tiras!"